

## Milda Jakubcová – aŭtorino de versaj fabloj

*Omaĝe al ŝia 110-a naskiĝjubiléo tiu ĉi temo estis prezentita en la esperantista societo en Brno-Kohoutovice la 17-an de junio 2009.*

Al la juna generacio de ĉeĥaj esperantistoj estas Milda Jakubcová persono pli-malpli nekonata. Supozeble ankaŭ en Latvio ŝi ne estas konata, ĉar kelkaj demanditoj, UEA-delegitoj en Riga, ŝia naskiĝloko, printempe 2009 ne respondis al la demandinto el Brno.

Milda Jakubcová naskiĝis la 23-an de majo 1899 en Riga, ŝi do estis latvino, ŝia fraŭlina nomo estas **Pirsts**, laŭprofesie oficistino, esperantistino ekde 1924. Ŝi edziniĝis al sia ĉeĥa korespondanto František Jakubec en la moravia urbo Brno. Post la dua mondmilito ŝi en la urbo kunfondis kaj estris la Esperanto-rondeton en la sindikata klubo de la fabriko *První brněnská strojírna* (Unua Brunna Maŝinfabriko). Ĉar ŝi mortis jam antaŭ jaroj (1979-10-14 en Brno), ankaŭ ŝia edzo, estas malfacile trovi detalojn pri ŝia vivo kaj verko.

Mi trovis, ke ŝi estis sekretario de Latva Esperanto-Asocio, kunlaborantino de „Ondo de Daugava“, kunredaktis la poemaron de J. Rainis kaj la volumon de tradukoj el la latva lingvo „Latva poezio“. Veninte al Ĉeĥoslovakio ŝi kontribuis al „Esperantisto Slovaka“, „Juna voĉo“, „Amikeco“ latva kaj estona k.a. En Slovakio oni nomis ŝin honora estrarano de Slovaka Esperanto-Societo. Oni memoras, ke ŝi verkadis „farse gajajn versojn“ sub diversaj pseŭdonimoj, sed nun ne sciataj. En mia biblioteko estas du ŝiaj verkoj:

*Elektitaj versaĵoj*. Brno (CZ): Esperantista rondeto ĉe la Sindikata klubo de *První brněnská strojírna*, 1969. Aranĝis Arnošt Baláš. 6 paĝoj.

*Estrado de animaloj*. Banská Bystrica (SK): Okresný osvetový dom, 1970. Aranĝis Ernesto Váňa. 112 paĝoj.

Pri sia hejmo ŝi rememoris en la poemo „Kie mia hejmo?“:

Kie Balta maro bruas  
ĉe la blanka duna strand',  
pinoj flustre kapojn skuas:  
tie – mia patroland'.  
Kie latvo latvon amas,  
ĝojon serĉas li en kant',  
nur por bono koroj flamas:  
tie – mia Sukcenland'.  
Kie Gauja senprokraste  
fluas preter arbar-rand',  
tie volus morti laste  
mi, en mia Latvoland'.

Pri emoj kaj sopiroj de Milda Jakubcová mi scias neniom, antaŭ multaj jaroj mi renkontis ŝin okaze de iu esperantista aranĝo, sed ŝi tie publike ne prezentis sin. Laŭ la poemkolekto „Estrado de animaloj“ ni povas ŝin taksu kiel natur-amanton, kiel defendanton de animala regno antaŭ la homo kaj lia antropocentrismo. En prologo al la „Estrado“ ŝi priskribis la animal-estradon kiel pompan manifeston, en kiu la animaloj preparolis sian situacion, iliaj voĉoj bolis kontraŭ homo pek-plena. Tamen la versaj fabloj ne estas nur protestaj, plurloke ili sin prezentas ankaŭ kiel ŝercaj. En la kolekto estas voĉoj de cent animaloj en cent poemoj.

**Afido** plendas, ke *hom-inoj ne volas plu akuŝi, sed naskon nur aborte fuŝi*. Kaj tuj afido aldonas: *Dum jaro naskas ni centmilojn, vivipovajn, etajn suĉ-gefilojn*.

En alia poemo **aglo**-reĝo versas: *Malforta estas homa reĝo, sidanta sur la trona seĝo: Popolon igas li militi, por el danĝero mem forgliti*.

**Alaŭdo** en la versa fablo renkontiĝas kun Ezopo kaj tiel ĉi finas la diskurson: „*En fabloj ĉiuj bestoj nome parolas kaj eĉ agas home.*“ – *Mi diras al Ezop' modeste: „Nun male – homoj agas beste.“*

**Anobio** plendas, ke post ĝia forto-streĉa peno, homo „*facilanime bruligas bufedon, breton kaj nin vivajn... Por homo havas ni indignon. Ni ŝatas lignon, lignon, lignon!*“

**Ansero** fiere vokas: *Ni iam nome savis Romon... ĝi estis granda sensacio. Sed fine ĝi, ansero, plendas: Dum vivo nin nur dolorigas, perforte li nin senplumigas...*

**Araneo** konfesas: *Ni pli ol homojn – muŝojn amas.*

Prave fiere parolas **azeno**, aŭdante homan insulton: *Azeno vi estas! – Ni aŭdas, se homo proksimulon laŭdas. Lernantoj uzas propagande azenan nomon nun pogrande.*

**Ĉevalo** ĝemas: *Min anstataŭas en laboro sputanta fumon la traktoro... Sed ŝajnas, ke fine de la fablo la ĉevalo jam kontentas: Viv-ŝarĝo min plu ne balastas, artiste mi en cirk' gimnastas...*

**Erinaco** ne timas homon. Ni aŭskultu:

*„Al mi sufiĉas eta spaco  
por vivi.“ Diris erinaco.  
„Mi idojn al labor' stimulas,  
je luksa viv' mi ne kalkulas.  
Zorgeman havas mi edzinon,  
gardanta hejman disciplinon.  
Mastrumas ŝi tre ekonomie,  
laboras en ĝarden' kaj dome.  
Se hom' ataki nin aŭdacus,  
mi nepre ne kapitulacus.  
Lin vundus pikilaro mia,  
dolor' lin kaptus konvulsia.  
Sed kiucele mi balbutu  
kaj vane pri la hom' disputu?  
Li estas io ideala –  
dum mi – estaĵo animala.*

**Fazano** en sia alparolo fanfaronas: *„Mi estas reĝa kortegano – mirinde bela or-fazano. Mi ankaŭ mian voĉon levas, pri homo plendi ege devas... Nin ekspionas hom' atence, mort-pafas nin sendiference... Kaj vokas al aktiva rezist: „Ni senarmigu ĉiun viron...“*

La plimulto de animaloj kritikis homon, tamen aperas kelkaj, kiuj lin defendas, ekzemple **gorilo**:

*En nura palpebruma daŭro  
gorilo venis kun bedaŭro,  
ke harojn ĝi ne povis frizi,  
por la kunvenon pli surprizi.  
„Asertis jam gazet' scienca,  
ke homo estas tre parenca  
al nia gento. Nu, tre bone,  
mi ne parolos senbezone.  
Se mi hom-fraton nun defendos,  
per tio mi vin ne ofendos.  
Cetere estas tre komike  
paroli pri la hom' kritike.  
Laŭ mia propra opinio,  
kulpiĝis nur evolucio,  
ke homo de ni malproksimas,  
ni lin – kaj male – li nin timas.  
Sed en edziĝ-aferoj amaj  
ni estas kun la homo samaj:  
Ĉe la edzino ni nur gastas,  
al nova amatino hastas.*

*Do ne kritiku kaj silentu!  
Al homo ĉiam komplimentu!  
Ho, tio estas vera fato,  
ke hom 'sin nomas – nia frato!“*

**Ĥameleono** laŭdas sian scipovon kaj al ĉiuj rekomendas la metodon: *Koloron laŭ bezon mi ŝanĝas, ĉe plena trogo ĝue manĝas... Mi estas diplomat 'konscia kaj vivo mia – tre varia. Modelon mian vi imitu! Disputon jam kun hom 'evitu!“*

**Koko** konfesas – kokerikas – sian problemon: *Posedas grandan mi haremon, do kiel solvi la problemon, ke ĉiujn inojn mi protektu, sed kelkajn por la am 'elektu.*

**Kopriso**: *„Priklaĉi homon mi ne povas, ĉar mi lin tre ĝentila trovas. Respektas homon genton mian, ni havas vivon idilian.“*

**Kulo** la homon ne laŭdas, ĉar *„Mort-gasojn kontraŭ ni preparas, pri sia sango li avaras.“*

Estas mirinde, ke **leono** ne instigas kontraŭ homo, male: *„Batali kontraŭ hom 'senĉese, nek estas noble, nek necese...“* Kaj la leono rimarkigas: *„Kelkiuj homoj devas gvati malantaŭ kradoj, kiel bestoj, en grizaj aŭ striitaj vestoj.“*

**Lupo** memorigas: *„...lupino iam bon-prospere mam-nutris ankaŭ idojn homajn, ne iajn-tiajn, sed la romajn. Ĉu estas hom 'kiu rakontus, ke lia ino mem volontus mam-nutri lupan suĉinfanon...? Plu ĝi rekomendas akcepti leĝon, ke homoj manĝu prefere legomojn kaj „ankaŭ lupoj sin viv-tenu, sataj en arbar 'promenu.“*

**Muso** homon laŭdi ne povas, kialon ni trovos en la fablo:

*Jen eta, tamen tre preciza,  
ekpepis nerve muso griza:  
Pri homo, kiun mi najbaras,  
konstatis mi, ke li vulgaras.  
Li senbezone nutras katon,  
enkorpigitan senkompaton!  
Rilatas ĝi al ni provoke,  
post-sekvas nin eĉ ĉiuloke.  
Prefere ni ĝin anstataŭus,  
se kato homon adiaŭus!  
Sed homo tiom prominenta,  
kun kato estas tre kontenta.  
Dum ni – musetoj – pli mult-nombre,  
sub tero devas vivi ombre.  
Ni homon do ŝton-koran trovas,  
neniel laŭdi lin ni povas.*

**Najtingalo** konstatas, ke la plimulto de animaloj homon kritikis, sed sian rilaton al homo ĝi komentas per la vortoj: *„Ne zorgas mi pri ĉi afero, mi vivas en alia sfero...“* Kaj tamen pozitive aldonas: *„Se homon la sufer 'izolas, per dolĉa kant 'mi lin konsolas.“*

**Porko** – ni scias – estas entute inteligenta besto. Tamen la homoj ĝin traktas draste. Ni aŭskultu la opinion de la estrada porko:

*Porkego nun sur la estrado  
kriĉegis kvazaŭ dum buĉado:  
„Severe homon mi akuzas,  
ke mian nomon li misuzas!  
Ĉar ĉiu drinkemul 'notora  
je mia nomo tre sonora –  
nomata estas! – Do mi plendas,  
ke homoj brute min ofendas.*

*Mi estas sobra, tre prudenta,  
mi – sciu! – estas abstinenta!  
Multfoje kuŝas hom' en koto  
ne kiel pork' – sed idioto!!  
Nin tre manĝigi homo penas,  
sed poste al buĉad' nin trenas.  
Ni ankaŭ devos nun kirasi,  
ke hom' ne povu plu frakasi  
aorton nian per tranĉilo –  
ni tiam vivos en trankvilo.  
Ni transloĝigos al arbaro,  
kaj ĝuos vivon sen amaro.“*

Al **puloj** homo kondukas persekute, tial la estrada pulo alvokis: „*Pular' tutmonda ke rekordu, ĝis sango homon mordu, mordu!*“

**Ŝafo** esprimas sin ŝate pri la homo: „*Mi pan-donanton klasifikas tre alte. Lin mi ne kritikis. Mi manĝas, saltas kapriole, kaj bleki povas libervole...*“

En la fablo pri **urso** la aŭtorino rememoris latvan legendon, laŭ kiu en pratempo ekzistis heroo latvo Laĉplésis, kiu per siaj manoj:

*Disŝiris urson latva filo  
de kap' ĝis vosto – sen pafilo!*

Sube de la paĝo la aŭtorino notis, ke Laĉplésis luktis ankaŭ kun la nigra kavaliro (germano) sur la bordo de la rivero Daugava, en kiun ambaŭ falis.

En la antaŭlasta fablo parolas **vulpo**. Fine de sia mesaĝo ĝi provas respondi la demandon: Kion vi farus, kiam la homo vin trenus al la morto?

*„Vi manon al la homo leku,  
plor-ĝeme antaŭ li vi bleku!  
Se vi denuncos propran fraton,  
vi havos bonan rezultaton.  
Vi penu homon subaĉeti,  
multfoje tion eĉ ripeti.  
Vi vivos, kiel grand-magnato,  
vi estos „tiptop“ diplomato!“*

Mi ne scias, kio inspiris sinjorinon Milda verki cent vivinstruajn fablojn. Mi ne scias, ĉu ŝi naskis kaj edukis infanojn. Por infanoj la fabloj estus interesa kaj favore eduka temo, tamen mi agnoskas, ke legi la fablojn estas ĝuo ankaŭ por mi, olda homo.

La fakto, ke ni rememoris unun el pluraj preskaŭ forgesitaj movadanoj en nia urbo kaj lando, estu instigo por plu serĉi modestajn pionirojn de nia movado, kies personeco kaj verko meritas honoran lokon en nia konscio.

*La rememoran tekston kompilis Jan Werner  
Brno la 13-an de junio 2009*